

Revuo
ESPERANTO
Internacia

N-ro 586 (9) SEPTEMBRO 1954



Ministro-Prezidanto D-ro Drees
alparolas la kongreson en flua Esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro : HANS JAKOB

Ĉion por la redakcio sendu al
ESPERANTO
Palais Wilson, Genève, Svis.
Urgajn informojn sendu rekte
al Rickmansworth

Traduko kaj represo de artikoloj estas
permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton.
Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Jara abono (1954) : 15 ŝil. anglaj (kun
membrecio kaj jarlibro 20 ŝil.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo	£6	½ paĝo	£3
¼ paĝo	30 ŝil.	⅓ paĝo	15 ŝil.

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respond-
kupono por ĉiu duo da vortoj

Legantoj en 80 landoj
Eldonnumero 6000

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la
revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj,
anoncetoj sendu al
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo



Enhavo

Specialaj artikoloj :	paĝo
Haarlem, la Floranta : <i>Hans Jakob</i>	225
Promenante tra la Kongreso : <i>Marek Wajsblum</i>	226
La Novaj Honoraj Membroj	240
27a Kongreso de SAT en Nancy, Francujo	242
Paul Bennemann, nekrologo : <i>Hans Jakob</i>	246
Niaj Kantoj : <i>Stepán Urban</i>	249
 Poezio :	
Eroj el Islanda Liriko : <i>Jon Thoroddsen</i>	244
 Konstantaj Rubrikoj :	
Enigma Konkurso	250
Esperantista Vivo	252
Internacia Konkurso 1954	239
Oficiala Informilo	251
Radio kaj Esperanto	248
Tra la Libraro	247

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-ro 586

Septembro 1954



Haarlem, la Floranta

CU estas ĉiam eble trovi kongres-urbon, kiu harmoniigas belon kun komforto laŭ vidpunkto de laboranta kongresano? Jam de jaroj sentiĝas kiel malfacile estas trovi idealan kongreslokon, kiu meze de somera sezono povas akcepti milojn da pliaj gastoj kaj kiu samtempe posedas teknikajn bezonaĵojn kiel konvenan kongresejon, salonegon por inaŭguro kaj ĉefe eblecon loĝigi la kongresanojn. Ne sen zorgo la respondecaj organoj de UEA ekzamenis ĉi tiujn—tiel gravajn—detalojn kaj hodiaŭ ni povas emfazi: Ĉio estis kontentige aranĝita; la kongreso, se ĝi ne superis la pasintajn, tamen atingis ilin. Tion ni rajtas diri sen troigo.


Avantaĝo laŭ propaganda vidpunkto estas grandeco de kongresurbo. En metropolo aŭ en grandurbo la kongresanoj perdiĝas, dum en Haarlem oni ĉie renkontis la verdan rubandon kun esperantistaj insignoj. Fiere flirtis verdstelaj flagoj sur multnombraj aŭtobusoj, plimulto de la restoracioj metis afiŝojn kun surskribo:

“Menuo-karto en Esperanto”, en iuj kelneroj eĉ parolis Esperante.

Kia bela, idilia urbo ĉi tiu Haarlem! Nenie la nederlanda individueco manifestiĝas tiel frappe kiel en tiu ĉi urbo. Plejofte nur duetaĝaj domoj, ĉiu domo kun alia stilo, aliaj konstruelementoj, aliaj variaĵoj. Dum horoj oni povas promeni kaj rigardi ĉi tiujn domojn kun fenestroj larĝaj kaj florumitaj. Ĉar la nederlandano amas florojn, kiujn lia lando printempe sendas ĉien.

Granda surprizo estis la inaŭguro prezidita de la Vicprezidanto D. Kennedy, la Prezidanto Ernfrid Malmgren estante grave malsana. Nu, ni aŭdis eble unuafoje Prezidanton de la Ministraro, Registaran Ĉefon alparolantan la kongreson en flua Esperanto.

Ekscelenco D-ro Willem Drees, poligloto, lernis nian lingvon bone kaj eĉ severa juĝanto ne trovis ion kritikindan. Lia parolado pruvis ne nur ke li estras nian lingvon, sed ankaŭ ke li komprenas la ideon de l'Esperantismo. Kaj kun vigla intereso li sekvis la



Haarlem: Turo de la Nova Preĝejo

programon de la inaŭguro ĝis la fino.

Apud agrablaj detaloj de la kongreso estas ankaŭ aliaj; vivo estas ja sinsekva kontraŭdiro. Novarangō de la statuto—tiu ĉi zorginfano de la gvidantaj povoj de UEA — fine trovis sian solvon: kompromiso en principaj demandoj estis atingita. Post kiam akceptos ĝin la Landaj Asocioj, ni povos ekiri sur nova vojo al novaj sukcesoj kaj iam atingi la celon.

Resume: Bonega organizo, riĉa programo—same labora kiel distra—kontentiga solvo de gravaj problemoj lacigintaj nin dum pasintaj jaroj. Kion ni diru plu? Jes, la dankon. La dankon al vi, Nederlandanoj, al vi la anoj de la Loka Kongresa Komitato gvidita de samideano Mabesoone, ĝusta viro sur ĝusta loko. Haarlem estos bela memoraĵo por tiuj kiuj partoprenis tiun ĉi kongreson.

Hans Jakob.

Marek Wajsblum

Promenante tra la kongreso

NIAJ Haarlemaj samideanoj pruvis sian kuraĝon entreprenante taskon kiu certe timigus ne-Esperantistojn: loĝigi la antaŭviditajn 2,000 gastojn inter 150,000 loĝantoj de la urbo tiel multe vizitata de turistoj. La realo rompis singardajn limigojn: anonciĝis ĉ. 2,400 anoj—la nombro plej alta depost la Viena kongreso en 1924! La malfacila tasko tamen estis brile solvita dank' al la admirinda nederlanda trafiksystemo, al afablo kaj bonvolo de Nederlandanoj kaj precipe dank' al senlaca laboro de S-ro N. H. Beun kaj liaj helpantoj. Esperantistoj saturis ne nur Haarleton—ili inundis la belan Lisse, la sunbanatan marbordon Zandvoort kaj lastaj ondoj de la invado atingis eĉ Amsterdamon. Junularo ĝuegis sian amasloĝejon en Overveen, meze de belega parko kie oni povis tutkore kanti, danci kaj muziki. Loĝiga servo priservis c. 1500 kongresanojn. Kaj sen troigo oni povas diri, ke ĝi brile sukcesis: gravaj plendoj estis tre malmultaj.

Almenaŭ flanke de la kongresanoj; la samideanoj el loĝeja servo ne plendis laŭte, kvankam ili havis multajn embarasojn pro subitaj malmendoj aŭ eĉ senceremonia ignoro de aranĝoj jam faritaj.

Inter Haarlemaj nomoj la kongresanoj certe ne forgesos tiujn de la afabla urbestro Mag. P.O.F.M. Cremers (lian Esperantan prononcon povus envii iuj Esperantistoj!) kaj de S-ro D. J. A. Geluk, la Skabeno por Instruado kaj Arto, kiuj faris sian provincan hejmurbon ĉefurbo de Esperanta popolo. Esperantaj standardoj kaj flirtaj flagetoj sur urbaj aŭtobusoj ŝvebadis sur ondoj de "Espero" kaj "Tagiĝo" sonorantaj de la turo de la Granda Preĝejo de S-ta Bavo el sub majstraj manoj de la fama kariljonisto J. G. Das.

Ne mirinde, ke en tia atmosfero venintoj el 28 landoj sentis sin tiel hejmece. Nederlando — la lando konscie kaj plane kreita de homoj — certe rajtis gastigi lingvon konscie planitan de homo por homaro. Kaj la movado de homoj pensantaj



Kongresanoj en naciaj kostumoj

internacie rajtis esti gastigata de la lando kies spiritan esencon difinis ties ĉefministro kaj nia samideano D-ro Willem Drees kiel internacian orientiĝon sen perdo de nacia karaktero.

Interkona Vespero

Oni povas diri, ke almenaŭ iuj kongresanoj atentis nur la duan parton de tiu difino. Dum la interkona vespero en la kongresejo oni vere povis konstati internaciecon de la kongreso—tiom da lingvoj ja aŭdiĝadis el ĉiuj anguloj de la plenpakitaj salonoj. La organizintoj tamen uzis novan spritan metodon: ĉiuduonhore aŭdiĝadis signalo por ŝanĝo de kuntablanoj. (Por evitigi iun korrompan tragedion, saĝe estis permesite al gesoluloj ne disiĝi). Kaj jam post dua migrado de popoloj la salonegoj eĥis nur per lingvo internacia kaj la nacioj kuniĝis en modelon de estonta homaro. Bedaŭrinde, ne tro multaj naciaj

kostumoj aperis en la amaso de kosmopolitaj vestoj. Inter la malmultaj palmon meritis Frisinoj en siaj belegaj delikataj brodaĵoj.

En Sankta Bavo

Unu el majstroverkoj de mezepoka Nederlando—la Granda Preĝejo de Sankta Bavo, harmonie kuniganta severan puron de romana stilo, ŝveban svelton de Gotiko kaj pompan riĉon de Baroko—amasigis Dimanĉe pli ol 1,500 Esperantistojn kiuj venis por aŭskulti predikon de Pastro F. A. Hofman (Arnhem), belegan orgenludon de S-ro Klaas Bolt kaj ĥoron gvidatan de S-ro R. Bakker—ĉiuj tri digne reprezentantaj nederlandajn kulturajn tradiciojn.

Dume, la centraj povoj de nia movado forĝadis planojn kaj finakrigadis argumentojn en siaj nealireblaj kasteloj. En la “Ora Leono” kunsidis la Estraro de UEA en kiu bonkora humoro de Hans Jakob, oratoraj skermoj de D-ro

Lapenna kaj sopra seko de C. C. Goldsmith estis ekvilibrigataj de prudenta gvido de la Vicprezidanto D. Kennedy. En kafejo Brinkmann karamboladis teorio kaj praktiko en debatoj de la Akademio.

Inaŭguro

Parolante pri inaŭguro, necesas reveni al la nomo de la nederlanda Ĉefministro kies figuro kaj brila Esperanta parolado certe eminentis super la maso de 2,200 kongresanoj plenigantaj la gigantan salonegon de "Krelagehuis". Tondra aplaŭdo salutis procesion de nederlandaj kaj internaciaj eminentuloj kiuj ascendis la estradon. Bedaŭrinde mankis inter ili la konata figuro de la Prezidanto de UEA, kiun grava operacio retenis en lia hejmo; digne anstataŭis lin la Vicprezidanto S-ro D. Kennedy. Agrable surprizis nin nova maniero komenci la kunvenojn, sed en artema kaj muzikema Nederlando estis ja nature, ke internacia kongreso komenciĝu per la plenvoĉa solkanto de S-ro Léon Combé.

En perfekta Esperanto bonvenigis nin la Urbestro Mag. P.O.F.M. Cremers kaj lia parolado estis konfeso de lia kredo je praktika kaj idea valoro de nia lingvo. La samon oni povas diri pri la parolado de nia eminenta samideano la Ĉefministro D-ro Willem Drees. Unuafoje aŭdiĝis ŝtatgvidanto proklamanta al la mondo ne nur simpatian al niaj idealoj, sed ankaŭ sian aktivan solidarecon kun nia movado—kaj ne nur en sia propra nomo, sed ankaŭ en la nomo de kulturaj idealoj de sia lando kaj nacio. Ne mirinde do, ke tiu parolado estis vera injekto de entuziasmo en la vejnojn de la kongreso.

Sinsekve donis salutojn registaraj reprezentantoj de

Aŭstralio (ĝen. konsulo Ralph Harry)

Aŭstrujo (D-ro Agstner, Legacia sekretario)

Belgujo (D-ro T. van Gindertaelen)

Brazilo (Konsilisto Mauricio Wellisch)

Francujo (S-ro Pierre Petit)

Germanujo (D-ro W. Herrmann)

Nederlando (S-ro D. de Hoog, Repr. de la Min. de Instruado)

Norvegujo (Kapt. R. Bugge-Paulsen)

Svedujo (Rektoro Karl Söderberg)

Svislando (Legacia Konsilisto Walter Bossi)

Urugvajo (Ministro V. Sampognaro kaj la Legacia Sek. E. N. Oribe).

Varme estis aplaŭdataj S-ro Ralph Harry por sia bela Esperanta parolado, la reprezentanto de Francujo por novaĵoj pri kreskanta subteno de edukaj instancoj al instruado de Esperanto, la reprezentanto de Svedujo kiu promesis restarigon de esperantaj radio-dissendoj, sed eble plej signifa estis la voĉo de la norvega registaro, kiu deklaris ke partoprenante en la kongreso, ĝi nur plenumas volon de sia popolo kies sesono subskribis la peticion al la Unuiĝintaj Nacioj.

La registarojn sekvas reprezentantoj de landaj asocioj de Esperanta popolo el

Aŭstralio (S-ro K. Smith)

Belgujo (S-ro J. Soyeur kaj por Flandroj S-ro Jan Jacobs)

Britujo (S-ro W. A. Gething)

Danujo (S-ro Sv. Dragsted)

Francujo (S-ro H. Philippe)

Hispanujo (S-ro Miralles)

Jugoslavujo (S-ino Emilija Lapenna)

Norvegujo (S-ro Jan Ekhaugen)

Nov-Zelando (S-ro R. J. Clarkson)

Svedujo (S-ro Jan Strönné)
 Svisujo (D-ro Arthur Baur)
 Norda Ameriko (S-ino D. Connor)
 Aŭstrujo (S-ro Walter Mudrak)
 Finnlando (S-ro Joel Vilkki)
 Germanujo (S-ro Paul Hübner)
 Japanujo (Profesoro Hideo Yagi)
 Meksikio (S-ro F. Azorin) kaj
 Sarlando (S-ro Jakob Schenkel)

Finiĝis salutoj. Kaj tiam tondrego de aplaŭdoj bonvenigis Profesoron Edmond Privat. Li venis malsana kaj ĝis lasta minuto oni ne sciis, ĉu li povos paroli. Malsano tamen ne sentiĝis en lia inspira parolado, kiu finiĝis per esperplenaj vortoj: “En unu sola glano kuŝas en potenco tuta arbaro—skribis Emerson, kaj certe la Esperantaj kongresoj estas edukejoj de la estonta unuiĝinta homaro. Estas bone, ke la semo ĵetita de Zamenhof havis la tempon kreski malrapide kiel juna kverko, ĉar la lingvo povis fariĝi vivanta. Ĝi nun enkorpiĝas la homaran senton, kiu ankoraŭ mankas al oficialaj mondaj institucioj”.

En kadrojn de sociologia formulo fermis tiun ideon Profesoro Ivo Lapenna, Direktoro de Centro de Esploro kaj Dokumentado, difinante Esperanton kiel esprimilon de la tria, homarana aspekto de la homa socia naturo, evoluiganta el ties regionaj kaj naciaj originaj aspektoj.

Eble la plej bonan omaĝon al la inaŭgura kunveno mi aŭdis el buŝo de iu juna “freŝe bakita” samideano, kiu diris al mi, ke ĝi estis por li la plej bona leciono de lingvo kaj ideo post kiu li sentas sin matura kaj plenrajta Esperantisto.

Ek al Laboro !

La Unua Ĝenerala Kunveno de UEA (Lunde la 2-an), prezidata de

S-ro Kennedy, estis inaŭguro de labora parto de la kongreso. Ĝi alportis ne nur salutojn de gravaj internaciaj organizaĵoj, sed ankaŭ ĝojajn novaĵojn pri forto kaj persisto de nia movado. Kiam dum la inaŭgura kunveno sekvis unu la alian reprezentantoj de landaj asocioj, multaj pensoj flugis al la forestantoj —al Polujo, la naskolando de nia lingvo, al Hungarujo, la lando de nia poezio, al bulgaraj entuziasmoj de la Verda Stelo, al Rusujo, al Baltaj landoj. . . . Des pli inspira estis alveno de saluta telegramo de Esperanta Seminario en Doksy pruvanta, ke nia movado vivas malgraŭ ĉio. (Ni menciis, ke poste alvenis ankaŭ salutoj de Esp. grupo en Praha). Dum la kvara kunsido de UEA atingis nin ankaŭ salutoj de samideanoj el Kladzko (Polujo). Same ĝojiga estis partopreno de portugalaj samideanoj, en kies lando nia lingvo (ne la movado tamen) estas apenaŭ tolerata.

Varme aplaŭdata estis raporto de la Estrarano de UEA S-ro A. Oliver, el kiu montriĝis, ke la Asocio kreskis je 400 anoj, likvidis siajn ŝuldojn kaj atingis buĝetan ekvilibron.

Progreso ankaŭ vidiĝis el raporto de D-ro Kempeneers pri Fakaj Asocioj; precipe la Fervojistoj kaj Instruistoj povas fieri pri rimarkindaj organizaj sukcesoj.

La raportan parton finis Prof. Lapenna, prezentante skizon de la grandega laboro farita de CED.

La parolo pasis al aŭskultintoj; sekvis vigla diskuto, ĉefe pri teknikaj aranĝoj, kiu lasis ĝeneralan impreson de aprobo por la agado de UEA kaj de ties gvidaj instancoj.

Esperanto kaj Unesko

La du aliaj kunvenoj, Lunde kaj Marde la 2-an kaj 3-an, prezidataj

de Prof. Lapenna, estis dediĉitaj al diskuto de nia kampanjo ĉe UNESKO kaj nature centris ĉirkaŭ CED kaj Montevideo. Dank' al informplena prelego de Prof. Lapenna pri UNESKO, ties programo, organizo kaj agado okazinta jam antaŭe en kadro de la Somera Universitato, la partoprenintoj estis bone preparitaj por la diskuto.

Enkondukaj vortoj de Prof. Lapenna certe ne estis facilanime optimismaj, sed impresis per volo de lukto kaj kredo je ties praveco. La situo ja ne estas facila: nur naŭ ŝtatoj, plejparte malgrandaj, aprobis la ideon enkonduki Esperanton en lernejojn, dum deknaŭ—inter ili la plej grandaj—respondis negative; la aliaj prudente detenas sin de opinio. Aliĝo de Sovetunio al UNESKO nur plifortigas kontraŭstaron de nacilingvaj egoismoj al lingvo internacia. Unaufoje Usono kaj Sovetunio alianciĝas kulture—kontraŭ Esperanto! Malgraŭ tiuj ironiaj perspektivoj, la kampanjo jam nun donis konkretajn rezultojn, vekante grandan intereson pri Esperanto (pli ol 1,500 artikoloj pri la Pariza decido de UNESKO!). Post la kampanjo restos al ni ankaŭ la dokumentaj eldonaĵoj de CED, kiuj fariĝis necesa ilo en manoj de ĉiu propagandisto. Kaj en Montevideo la granda Esperanta ekspozicio mobilizos ĉiujn pruilojn, ke nia lingvo estas neignorebla socia realo. Montevideo fariĝos ankaŭ elirpunkto por propaganda “invado” de Azio, kien iros ekspozicioj organizotaj el ricevataj materialoj. Esperantistoj komprenis gravecon de tiu entrepreno. Unue la Svedoj, kiuj donacis trionon de la koletita mono. Kortuŝa estis la gesto de polaj samideanoj, kiuj ne povante

sendi monon, aĉetis librojn kaj sendis ilin por disvendo. Mankas tamen multa mono kaj necesas plua oferemo de la Esperantistaro.

Kiel sciante, por orientiĝi pri la sinteno de politikaj kaj kulturaj rondoj, CED iniciatis larĝskalan enketon. Ties (partaj) rezultoj en Nederlando (raportis F-ino Vermaas) Kroatujo (S-ino Lapenna), Italujo (S-ro Fighiera), Sarlando (S-ro Schenkel) kaj Francujo (Prof. Lapenna) montras unuaflanke kreskantan apogon en moderaj kaj modere maldekstraj politikaj movadoj kaj formiĝadon de stranga kontraŭ-Esperanta alianco de ekstrema dekstro kaj de komunistoj. Instrua estas en tiu rilato la akre negativa respondo de la franca komunista partio. En kulturaj rondoj regas malcerteco kaj konsiderinda ignoro. La enketo—kvankam nekompleta—jam nun alportis rezultojn ne nur informajn, ĉar ĝi elvokis grandan intereson pri Esperanto kaj fariĝis elirpunkto de propagando, precipe en Nederlando.

Disvolviĝis vigla diskuto pri politikaj kaj kulturaj aspektoj de la kampanjo. Realisme traktis ĝin S-ro Petit (Francujo), akcentante neceson de zorge planita ofensivo sur politika kampo, kiu jam nun donas bonajn rezultojn en Francujo. D-ro Wajsblum (Britujo), konstatante moralan kaj politikan bankroton de UNESKO en kazo de la peticio por Esperanto, emfazis tamen pri grandega propaganda ŝanco, kiun la kampanjo donas al la movado. Intervenis Prof. E. Privat, klarigante historian fonon de la afero kaj Prof. Lapenna asertante sian luktovolon kaj fidon pri pozitiva rezulto de la kampanjo en pli larĝa senco.

Resumante la diskutojn, Prof. Lapenna konkludis, ke ĝisnunaj observoj montras, ke estontaj aktivecoj devas konsisti precipe el larĝa kaj objektiva informado de kulturaj kaj politikaj instancoj, sed necesas ankaŭ energia kaj bone planata laboro ĉe la bazo, inter amasoj.

Tiun linion sekvis ankaŭ kunveno de Informaj Fakoj de Landaj Asocioj. Prijuĝo de informaj servoj de UEA, komparo de gazetservaj metodoj (ĉefe de la sveda kaj itala asocioj) donis tre interesajn indikojn pri teknikaj ebloj de tiu fako. Eĉ pli: la kunveno (ni esperu) iniciatis propagandan "invadon" de Azio. La unua ĉenero kaptota estas azia studentaro ĉe eŭropaj kaj amerikaj universitatoj; iliajn landojn penetros dume anglalingva eldono de la gazetservo kaj azia aranĝo de la propaganda faldfolio eldonota en pluraj lingvoj. La kunveno estis malgranda, ĉar limigita al "fakuloj", sed ĝia fruktodona laboro sugestas, ke eble estus konsilinde organizi dum estontaj kongresoj similajn kunvenojn de aliaj fakuloj pri movado—ekz. pri internacia korespondado, grupadministrado, grupprogramoj, k.t.p.

La lasta, kvara ĝenerala kunveno de UEA, Vendrede la 6-an, malfermiĝis per funebra noto: La saluttelegramon de Wanda Zamenhof sekvis samtaga telegramo pri ŝia morto en strata akcidento. Ŝiriĝis ankoraŭ unu ligilo kun nia Majstro.* La kunveno decidis sendi kondolencan telegramon al ŝia filo, Ludoviko Zamenhof.

Aplaŭde akceptis la kunveno belan flagon senditan de la Brazila Esp. Ligo. La flago, donacita de D-ro



*D-ro Erlindo Salzano
Vic-ŝtatestro de Sao Paulo, Brazilo*

Erlindo Salzano, vic-ŝtatestro de la ŝtato São Paulo, Brazilo, kaj Dumviva Membro de UEA, irados ĉiujare al la landa asocio venkinta en la internacia konkurso kaj la gajninto, rajtos aldoni al ĝi sian nacian rubandon.

Ĉefa temo de la kunveno estis raportoj de fakaj kunvenoj (S-ro Walder por Internacia Federacio Esperantista Fervojista, D-ro Makkink por Internacia Scienca Asocio Esperantista, F-ino Nixon por Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, S-ro de Boer por Kristana Esperantista Ligo Internacia, F-ino Vermaas por Universala Ligo, D-ro Kempeneers por Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio kaj S-ro A. Oliver por Esperantaj Eldonistoj).

Scienco kaj Studo

Malfacile estas raporti pri la Sepa Laborperiodo de la Somera

* Biografia noto aperos en sekvanta n-ro de Esperanto.

Universitato, ĉar oni devus almenaŭ skizi enhavon de ĉiu prelego. Nur unu aserton oni povas fari: ĝi estis brila sukceso. La prelegintoj elektis temojn de ĝenerala homa intereso. Por kongresaj laboroj estis grava prelego de Prof. Lapenna pri UNESKO. Vastajn horizontojn malfermis Prof. Privat ("Orienta kaj Okcidenta Kulturo"), montrante rimarkindajn paralelojn de homara idealo en ambaŭ kultursferoj kaj idean parencecon de Zamenhof kun gvidaj mensoj de la homaro. Mi ne povas mencii aliajn—kvankam certe menciindajn—prelegojn. Malfacile estus trovi tian areopagon de intelektoj. Nur unu rimarko. Multnombra aŭskultantaro pravas intereson de Esperantistaro por scienco kaj ĉiuj ni portos hejmen profundan impreson de tiuj horoj. Kial ni ne kunportu tiun impreson en presita formo? La nombro de aŭskultintoj certe estis sufiĉa por certigi eldonan bazon por libro enhavonta plenan tekston de la prelegoj. Ĉu ne estus do eble, ke kongresaj kotizoj enhavu ankaŭ laŭvolan alpagon por la prelegaro? Se la intereso montriĝos ne sufiĉa, la mono estus redonita—se la afero sukcesos, sinsekvaj volumoj de la Somera Universitato estos bela aldono al nia scienca literaturo.

Kvazaŭ kompletigo de la Universitato estis renkonto de la Akademio kun iliaj "regatoj", Vendrede la 6-an. Tri problemoj estis diskutataj: Prononco (Pastro Cseh), Milito de la -ata kaj -ita (Prof. Waringhien) kaj Uzo de-as kun adjektivaj radikoj (S-ro Isbrucker). En diskutoj partoprenis egalrajte akademianoj kaj aŭskultantoj kaj la preskaŭ pasia viglo de lingvaj bataloj pruvis utilon

de la kunveno, kiu devas fariĝi konstanta ero de niaj kongresoj.

Malfacile estas decidi, ĉu raportoj pri la nederlanda prelegaro sub rubriko "Studo" aŭ "Distro"? Instruaj la prelegoj certe estis kaj la kongresanoj multe lernis el ili pri sia adopta kongreslando el la lumbildoj, filmoj kaj akompanantaj klarigoj. Humoro tamen de Mag. A. J. Kalma kaj elokvento de S-ino Bramkamp-Weber faris el tiuj prelegoj vere ĝuajn horojn.

Inter Fakuloj

La longa listo de mallongigoj sur p. 64 de la Kongresa Libro plej bone atestas pri varieco de fakaj interesoj en la kongreso. Detalaj raportoj aperos poste. Mi nur menciu, ke laŭ nombro de partoprenantoj superis la Instruistoj; ke la Kooperativistoj sukcese kontaktis kun nederlandaj kolegoj; ke Fervojistoj notis belajn sukcesojn en sia agado; ke Sciencistoj konsideris gravan organizon entreprenon; ke Kuracistoj fine fortigis sian organizaĵon kaj restarigas sian agadon, k.t.p.

Ni ne povas tamen preterlasi la Blindulan Kongreson, kiun partoprenis ĉ. 170 anoj el 14 landoj, i.a. el Nov-Zelando kaj Japanujo. Ĉiu kiu parolis kun niaj blindaj samideanoj, povis konstati kian grandan ĝojon donas al ili lingvo internacia, vastigante ilian mondon limigitan per ilia kripleco. Decidita estis interveno ĉe la internaciaj kongresoj por blinduloj. La kongreso koincidis kun la 25-jara jubileo de la Nederlanda Societo por Blindaj Esperantistoj, kiu estis gaje festata en aparta kunveno.

Poezio, Arto kaj Retoriko

La kunvenon pri belarta konkurso, prezidatan de Prof. Waringhien

Internacia Somera Universitato

Haarlem 1954

La prelegantoj



D-ro C. C. BERG
Nederlando



D-ro W. E. COLLINSON
Anglujo



L. LAURAT
Francujo



D-ro E. PRIVAT
Svislando



D-ro P. NEERGAARD
Danlando



D-ro W. P. ROELOFS
Nederlando



D-ro I. LAPENNA
Anglujo



D-ro M. Roost
Belgujo



D-ro H. SIRK
Aŭstrujo



D-ro HIDEO YAGI
Japanujo

(Merkrede la 4-an) inaŭguris per koncerto la urba orgenisto S-ro G. Robert.

Bedaŭrinde, en poezia konkurso mankis ĉefaj reprezentantoj de la skota skolo, kiu tiel brile distingiĝis en pasintaj jaroj. Almenaŭ morale rekompencis tiun mankon la ĝojiga novaĵo, ke nia poezia majstro Kalocsay ne nur reasertas sian fidelon al Esperanto, sed ankaŭ revenas al poezia kreado kaj preparas novan aranĝon de sia traduko de Baudelaire. Alia surprizo estis multnombra kaj sukcesa partopreno de ĉeĥoslovakaj samideanoj, kiuj gajnis 5 el la 14 aljuĝitaj premioj.

La unua premio por originala poezio estis aljuĝita al S-ino Eli Urbanová (Praha) por ŝia lirika "Antaŭ spegulo"; al meditema idealisto tre plaĉos tamen "Premsonĝo" de Claude Piron (Belgujo), bildiganta la sufokan atmosferon de atombomba epoko (2-a premio). En traduka poezio distingiĝis Poul Thorsen per sia elstara traduko de la makabra "Leprulo" de H. H. Seedorf. (Li gajnis ankaŭ 3-an kaj 4-an premiojn por originala poezio). Originala prozo ne atingis tre altan nivelon, kvankam ĉiu ĝuos folkloran ĉarmon de la fabelo pri "Un-sennah kaj Um-sentin" de Jean Delor (Francujo; 1-a premio). La samon oni povas diri pri originala dramo. Dank' al iniciato de niaj nederlandaj samideanoj, ni povis ĝui sur la estrado la simplan kaj spritan komedieton "Korespondu!" de Antoni Seeman (Praha), kiu gajnis la solan aljuĝitan premion.


Ne tro sukcesa estis grafika konkurso. Por afiŝo unuan premion ricevis S-ro Mario Simondetti (Italujo); por librotitolo ne estis aljuĝita premio.

Anstataŭ jam tradicia oratora konkurso por junularo estis aranĝita junulara debato pri la influo de lingvo je interhomaj rilatoj. Ŝajnas, ke niaj oratoroj ne devas zorgi pri estonteco de Esperanta oratora arto: la partoprenintoj pruvis, ke la juna generacio de Esperantistoj scipovas pensi kaj esprimi siajn pensojn. Rezulte, la du unuaj premioj estis egale aljuĝitaj al S-ro Sv. Budimir (Jugoslavujo) kaj al F-ino H. de Ketelaere (Belgujo). Kun speciala simpatio estis bonvenita aljuĝo de la tria premio al S-ro J. Wells (Anglujo), kiu — kvankam blindulo — sen iuj skribaj notoj plene mastris la debaton kaj distingiĝis kiel oratoro.

Plezuroj

Certe, ni ĝuis multon en laboro kaj studo, sed ne mankis distro kaj amuzo. Unuavice ni nomu la Artan Vesperon en la Urba Teatro (Lundo-Merkredo, la 2—4-an), kie la fama trupo "Ballet der Lage Landen" (Baleto de Malaltaj Landoj) regalis nin per sia altnivela prezentado. Grandan sukceson havis la folklora kaj gaja "Fiaskinta svatado"—temo ĉerpita el komedio el XVII jc. Malfacile estas nomi elstarajn dancistojn aŭ apartajn erojn de la programo, kiuj meritis nian specialan dankon, ĉar la trupo impresis per sia harmonio kaj egala nivelo de arta laboro. Mi persone ĝuis la klasikan "Baletstudejon" inspiritan de pentraĵoj de E. Degas. Vera surprizo estis por ni la dua parto de la programo, en kiu Nel Oosthof, la mondfama deklamistino, prezentis al ni la vervoplenan "Konferenco de la bestoj" de Erich Kästner (traduko de S-ino J. C. Isbrucker-Dirksen), en kiu bestoj, pli saĝaj ol homoj, uzurpas al si iniciaton en rekonstruo de internaciaj rilatoj—por bono de

infanoj. Tian deklamon—plenvoĉan, senkompare vastskalan en rimedoj de artisma esprimo—mi ne ĝuis depost “dudekaj jaroj”, la jaroj de granda deklamarto inspirita de sociaj ideoj. Malfacile estis kredi, ke la artistino lernis nian lingvon dum la lastaj du monatoj, speciale por la kongreso !



Urbodomo, Haarlem


Tiuj eminentuloj kiuj ricevis afablan inviton de la Urbestro kaj Skabenoj de Haarlem al akcepto en la Urbodomo (Merkrede la 4-an), travivis ĉarman vesperon en la belegaj antikvaj salonoj, ornamitaj per trezoroj de nederlanda arto, admirante perfektan Esperantan prononcon de la Urbestro kaj ĝuante bonan vinon kaj nederlandajn frandaĵojn malavare disdonitajn al la gastoj.

Lacaj kongresanoj ĉiutage havis ŝancon forkuri el la debatejoj al boata rondveturo sur la belaj kanaloj de Amsterdamo kaj admiri trezorojn de la Ŝtata Muzeo ; aliaj preferis migri al la mondfamaj floraŭkcioj en Aalsmeer. Ne mencienda, estas ĉiuj ekskursoj fakaj, grupaj, distraj—kaj speciale la spontane “ekecaj” migradoj de la junularo. Ĵaŭde tamen, la 5-an, la kongresejo tute malpleniĝis : la kongresanaro ekskurse invadis tutan Nederlandon. Unu taĉmento iris al Alkmaar, Volendam kaj insulo Marken por admiri centrojn en kiuj konserviĝis la malnovaj

folkloraj trajtoj. Alia—al la floranta Aaksmeer, al metropola Hago, fine al la fama marborda restadejo Scheveningen. Aliaj fine, veturante tra Alkmaar kaj revenante tra Volendam, havis ankaŭ ŝancon admiri la grandan fermdigon, unu el la majstroverkoj de nederlanda genio. Ne necesas emfazi pri bonega organizo kaj pri kora gastamo de komunumaj aŭtoritatoj en ĉiuj lokoj vizititaj. Veran dankemon ŝuldas la pli ol 600 partoprenintoj al Ges-roj Hans Bakker, la organizintoj de la ekskursoj.

Kaj vespere, reveninte el la ekskursoj, muzikamantoj havis bonan ŝancon admiri en la Granda Preĝejo de S-ta Bavo la altajn tradiciojn de nederlanda orgenludo, digne reprezentitaj en la koncerto de la urba orgenisto S-ro Georgo Robert ; partoprenis ĝin ankaŭ fama kantistino, nia fervora Haarlem'a samideanino F-ino Annie Schoen.

Kompletigis kongresajn plezurojn la Internacia Balo en Krelagehuis. Al intima atmosfero kreiginta dum la semajno de kunvivo kaj kunlaboro kontribuis ankaŭ bela florornamo de la salonego donacita de la floriĉa urbo. La balon honoris per sia ĉeesto la Florfeino de Haarlem, ĵus elektita dum la Flora Semajno koincidanta kun la kongreso.



Katedralo

Procesio de ĉarmaj kongresaninoj en naciaj kostumoj solene akompanis ŝin al la podio, kie ŝi alparolis nin en bela Esperanto. Kompreneble, oni dancis fervore kaj plej fervore dancis la veteranoj retrovintaj sian junulan vervon en la viviga atmosfero de la kongreso. Al gajeco kontribuis la tipa nederlanda muzikilo—granda stratorgeno ludigata de pitoreske kostumitaj orgenistoj. (Ni ne forgesu ankaŭ la etan Simone, la nepineton de la maljuna orgenisto, kiu kaptis ĉies korojn per sia infana ĉarmo kaj per ĉarmo de sia bela kostumo).

La Fermo

La kongreso finiĝis. Sabate matene la kongresanoj kunvenis lastfoje por fari bilancon de la semajno. Antaŭ la tagordo, Hans Jakob dediĉis kortuŝajn vortojn al la memoro de Wanda Zamenhof kaj tuta ĉeestantaro honoris ĝin per ekstara kaj momento de ĉagrena silento.

Sekvis raporto pri la laboroj de la UEA Komitato kaj Estraro. Parolis unue D-ro Kempeneers, skizante la laborplanon por jaro 1955, kaj pri la reformulado de la principoj kaj agado de la Asocio. Varma aplaŭdado esprimis la konsenton de la kongreso pri la aljuĝo de Honora Membreco al

D-ro Karl Dworschak,

Ĝenerala Poŝtdirektoro de Aŭstrujo,
kaj

D-ro Hannes Frenzel,

Eks-Ministro, Prezidanto de la
Ŝtata Kalkul-Kortego

dankesprimo pro ilia agado favore al nia afero. La tria honorato estas

Cecil C. Goldsmith,

Ĝenerala Sekretario de UEA
elektita kiel Honora Membro pro lia senlaca laboro dum jardekoj por Esperanto kaj UEA.

Prof. Lapenna resumis diskutojn pri UNESKO kaj proponis la jenan rezolucion, aplaŭde akceptitan de la kunveno:

La 39-a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Haarlem (Nederlando) de la 31-a de Julio ĝis la 7-a de Aŭgusto 1954 en ĉeesto de 2100 kongresanoj el 28 landoj, post detala esploro kaj diskuto pri la kultura kaj politika aspektoj de la lingva problemo en la internaciaj rilatoj, unuanime decidas:

1. La Esperanto-Movado rekonfirmas sian pretecon kontribui per ĉiuj disponeblaj rimedoj ankaŭ en la estonteco al la realigo de la grandaj idealoj kaj celoj de UNESKO.
2. La Kongreso esprimas sian profundan konvinkon, ke la lingvaj malfacilaĵoj prezentas unu el la ĉefaj obstakloj al pli bona interkompreniĝo inter la popoloj kaj tial petas ĉiujn registarojn de la ŝtatoj-membroj de UNESKO doni sian apogon al la Internacia Peticio favore al Esperanto, pritraktota de la Oka Sesio de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Montevideo.

Decidite estis sendi telegramon al la Ĉefministro de Francujo kun peto, ke sekvante la progreseman tradicion de franca intelektularo, la registaro donu apogon al la Esperanta peticio.

D-ro Pragano kaj Prof. Waringhien anoncis rezultojn de la junulara debato kaj de belarta konkurso. La premiitoj laŭvice suriris estradon por ricevi diplomojn el manoj de du sinjorinoj en belaj naciaj kostumoj.

Dankon de la kongreso al la speciala poŝtservo esprimis Hans Jakob. La kongresa poŝtoŭicejo

prizorgis ja 60,000 sendaĵojn dum 6 tagoj !

La Prezidanto de LKK, S-ro Mabelsoone esprimis sian omaĝon al ĉiuj partoprenintoj de organizaj laboroj, speciale tamen al “kongresaj vidvinoj”, de kiuj la kongresaj kaj komitataj laboroj rabis iliajn edzojn. Ĉiun nomon salutis dankaj aplaŭdoj kaj ĉiu nomito (krom tiuj, kiuj eĉ dum tiu solena momento rifuzis forlasi sian laboron) aperadis sur la estrado por ricevi florojn (iuj ankaŭ skatolon da nederlanda ĉokolado) el manoj de S-ino Mabelsoone. (Aplaŭdataj estis ankaŭ la kisoj, kiujn ŝi interŝanĝadis kun pridonacataj honoratinoj). La liston finis la nomo de S-ro C. C. Goldsmith, kiun S-ro Mabelsoone dankis kiel UEA-ano kaj speciale kiel ano de nederlanda Esperantistaro, kun kiu li tiel lojale kaj helpeme kunlaboradis. En nomo de siaj samlandanoj, S-ro Mabelsoone prezentis al li belegan delftan vazon—kiel bonhumore rimarkis la “eta giganto”—preskaŭ same grandan kiel li mem.

Venis momento decidi pri la sekvonta kongreso. La estradon suriris S-ro Azzi por danki la nederlandanojn per sia soneto :

Holando

Al tero de la paco kaj laboro
pilgrime mi, Holando, al vi venas :
muzik' de l' ventomuelil' min tenas
kaj la parfumo de la beda floro.

Gigante, streĉe luktas la popolo,
pecon post pec' el mar' la humon
prenas ;
muĝas la akvo, sed la hom' serenas
post digoj, ĝoje, laŭ kampara moro.

La ŝipoj sulkas vian maron strie,
en la havenoj riĉa vivo regas,
en viaj homoj kaj naturo ĉie

arton de Rembrandt kaj Frans Hals
mi legas.

Al la toler', kompreno vekaj
la saĝa vorto de Erasmo tie.

Kaj li kaj lia samlandano Zacconi
finis sian omaĝon al Nederlando per
promeso egaligi iliajn laborojn en
Bologna.

Tiam, sur ondoj de orgena muziko
ekŝvebis tra la salonego la potencaj
sonoj de “La Espero”. La kongreso
estis finita—komenciĝis nova
laborjaro, en kiu atendas nin taskoj
eble decidontaj pri estonteco de nia
movado.

Provo de Bilanco

Ankoraŭ estas tro frue por
statistike pritrakti la propagandan
efikon de la kongreso. Sendube
tamen ĝi estos grandioza. La
Gazetara Servo organizita de S-ro
Blokker kaj liaj sindonaj helpantoj
funkciis pli ol senriproĉe kaj ĝiaj
abundaj, klare presitaj bultenoj kaj
raportoj en Esperanto kaj en
nederlanda lingvo, bonega kaj rapida
priservo de korespondantoj kaj
raportantoj—ĉio ĉi certigas merititan
sukceson. Ni rajtas esperi, ke la
kongreso lasos profundan kaj daŭran
impreson en la kultura vivo de
Nederlando. En lando kun tiel
fortaj interlokaj kontaktoj ĉiuj
eventoj rapide disradias tra ĉiuj
urboj. Ne mirige do, ke la kongreso
jam nun elvokis vastan eĥon en la
landa gazetaro kaj en nederlanda
radio, kiu preskaŭ ĉiutage
disaŭdigadis informojn, impresojn,
intervjuojn, k.t.p. Jam antaŭ la
fino de la kongreso iuj kongresanoj
povis admiri sin mem sur ekranoj
de kinoj. De tiu vidpunkto la
kongreso brile sukcesis.

En la unuaj tagoj la LKK sendis
saluttelegramon al la Nederlanda


reĝino, kaj poste alvenis la jena respondo (tradukita) :

10 aŭgusto 1954

Ŝia Reĝina Moŝto komisiis al mi transdoni ŝian afablan dankon pro la tre ŝatata telegramo al Ŝia Reĝina Moŝto sendita de la kongreso en Haarlem.

*Privata sekretario de Ŝia Reĝina Moŝto
W. J. Baron van Heeckeren van
Molecaten.*

Por ni ĝi firmigis nian volon al lukto kaj montris novajn kampojn kaj indikis novajn vojojn de nia laboro. Kaj tamen ŝajnas al mi, ke ĝuste la grandega sukceso de Haarlem devas esti por ni grava averto. Ĝuste pro tiu sukceso eksentiĝis bezono reorganizi niajn kongresojn tiel, ke ili permesu al fakuloj de nia movado en intimaj rondoj pridiskuti konkretajn teknikajn problemojn, ke la programo estu rearanĝita tiel, ke tiuj problemoj neinteresas por la amaso de kongresanoj, sed ofte decidaj por sukceso de nia movado, trovu pli grandan konsidereblon dum la kongresoj. *Marek Wajsblum.*



Groenendaal, Heemstede

La protestanta kongresa Diservo estas elsendita de la Nederlanda Radio-Asocio. Por niaj statistiko kaj laboro ni bezonas scii, kiuj kaj kiom da landoj aŭskultis la elsendon. Bonvolu sendi simplan sciigon al : D. de Boer, sekretario de K.E.L.I., Druivenstraat 32, Den Haag, Nederlando.

ESPERANTO KAJ SOCIOLOGIO

La Internacia Komisiono "Esperanto kaj Sociologio" kunvenis sub prezido de S-ro W. A. Gething kaj Prof. L. Laurat (D-ro W. Solzbacher, la komisiona prezidanto, estis malhelpita ĉeesti). Pritraktitaj temoj estis interalie :

Jarraporto 1953-54, kiu menciis pri diversaj kontaktoj de la komisiono, pri farita laboro kaj entreprenitaj pristudoj ;

decidoj por la nova jarperiodo : starigo en interkonsiliĝo kun I.S.A.E. de studrondo pri kulturaj kaj sciencaj servoj kaŭze de dum la kongreso esprimitaj proponoj de Ekc. R. Bagnulo (Bologna), Prof. J. Vanĉiĉ (Zagreb) kaj D-ro M. Wajsblum (London) ;

entreprenado de la necesa preparlaboro por esperantlingva sociologia terminaro.



HAARLEM

Kiuj vidis ĝin, trovos trafajn kaj karajn memorojn.

Kiuj NE vidis ĝin, ricevos impreson esti ĝin vidinta per legado de la libro

HAARLEM

48 paĝoj, sur luksa papero, kun 22 grandaj klarfotoj, plus bela kovrilo.

Prezo, broŝ. 2ŝ. 3p., aŭ frankite.

Eldonis : De Toorts, Heemstede.

Havebla ĉe la libroservo de U.E.A.

SKOTLANDO

La 24an ĝis 31a de julio ĉe Newbattle Abbey Kolegio, apud Edinburgh, okazis Antaŭkongresa FERIA Semajno, kiun partoprenis samideanoj el 8 landoj. Memorindaj inter interesplenaj programeroj estis oficiala akcepto ĉe la urbdomo, festeno memore al la skota poeto Robert Burns, vizito de sakfajfistaro, elmontro de trupo da folkdancantoj en la luksa salonego, kaj koncerto en apuda altlernejo. 400 personoj ĉeestis la koncerton, kiu estis aranĝita de la Midlothian Eduka Komitato. 120 infanoj el 9 lernejoj, kiuj ĵus finis 10-semajnan kurson pri Esperanto, kantis kaj ludis teatraĵetojn en la Internacia Lingvo. Inter la aŭdantaro estis membroj de la provinca kaj nacia edukaj instancoj, kiuj esprimis kontenton pri la koncerto.

SOMERA KURSO DE KELI EN SVEDUJO

La depost 1947 tradicia somera studkurso por la svedaj KELI-anoj okazis ĉijare en la kristana popola altlernejo de Jönköping. Kunaranĝanto estis Libereklezia Studfederacio kiel peranto de la ŝtata subvencio. Partoprenis 33 personoj krom kelkaj infanoj, sed venis ofte ankaŭ interesuloj kaj gesamideanoj vizite el proksimaj lokoj. La programo entenis 12 prelegojn (de L. Vasiljef pri la Bibliaj profetaĵoj rilate al Izraelo kaj pri Kristanaj vivaspektoj, de D-ro J. Stenström pri Sveda Esperantigita literaturo, kaj de S-ino Alamo-Sandgren pri historio kaj studado de Esperanto). Tri publikaj Diservoj kun predikoj (interpretitaj) kaj kantado en Esperanto kunigis ĉ. 500 personojn.

Internacia Konkurso 1954

Stato je la 31a de julio

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Finnlando ..	2000	2770	138.5
2.	Kanado ..	250	325	130.0
3.	Sudafriko ..	300	390	130.0
4.	Germanujo ..	3600	4070	113.0
5.	Maroko ..	700	790	112.8
6.	Urugvajo ..	250	280	112.0
7.	Svislando ..	1500	1655	110.3
8.	Danlando ..	2500	2725	109.0
9.	Nederlando ..	4600	5005	108.8
10.	Jugoslavujo ..	1600	1726	107.9
11.	Italujo ..	2900	3125	107.7
12.	Svedujo ..	5900	6200	105.0
13.	Portugalujo ..	500	515	103.0
14.	Japanujo ..	900	905	100.6
15.	Francujo ..	5600	5502	98.2
16.	Islando ..	350	335	95.7
17.	Usono ..	2300	2195	95.4
18.	Aŭstrujo ..	850	810	95.2
19.	Hispanujo ..	1600	1515	94.7
20.	Britujo ..	9500	8727	91.8
21.	Novzelando ..	850	771	90.7
22.	Aŭstralio ..	1000	860	86.0
23.	Belgujo ..	2300	1970	85.7
24.	Kubo ..	250	210	84.0
25.	Izraelo ..	250	190	76.0
26.	Irlando ..	250	175	70.0
27.	Venezuelo ..	250	165	66.0
28.	Norvegujo ..	2300	1515	65.8
29.	Argentino ..	950	605	63.7
30.	Brazilo ..	6400	3300	56.5

Tutmonda

Esperanto-Junular-Organizo

Fine de julio okazis en Hilversum la 10a internacia kunveno de T.E.J.O.


La programo de la Kongreso enhavis diskutojn, ekskursojn al Hago kaj miniatura urbo Madurodam, viziton al radio-elsendejo, oratoran konkurson kaj prezentadon de kolorfilmo pri Nederlando.

La nova estraro de T.E.J.O. konsistas el la sekvantaj membroj: R. Kraefft, K. Kranenburg kaj S-ino E. Burgler, Nederlando; H. Reiter, Aŭstrujo; L. Giloteaux, Francujo; kaj H. Lehmann, Germanujo.

La venontjara kongreso okazos en L'Aquila (Italujo).

La Novaj Honoraj Membroj

(vidu Kongresan Raporton, paĝon 236)



D-ro Karl Dworschak

D-ro Dworschak naskiĝis en 1903, studis en universitato de Wien, kaj en 1927 fariĝis oficisto de la aŭstria poŝt- kaj telegraf-administrado. En 1938 li estis maldungita, kaj post la milito, en 1945, transprenis la rekonstruon de la nova nacia poŝt-kaj telegraf-administrado, fariĝante ĝia ĝeneraldirektoro en rango de ŝtata sekcia ĉefo (plej altranga oficisto).

Kiel studento li lernis Esperanton, kaj estis regajnta por la movado de S-ro Kalkul-konsilanto R. M. Frey. Kune kun S-ro Frey li gvidis la agadon por la UNESKO-petskribo en Aŭstrujo, kiun subskribis la federacia kanceliero D-ro h.c. inĝ. Figl kaj la instru-ministro D-ro Hurdes, kaj la plej granda aŭstra politika partio, la popol-partio (O.V.P.) por siaj 650,000 membroj. Lian aktivan intereson al la Esperanto-movado dokumentas lia aktiva partopreno en diversaj gravaj E-aranĝoj, eldono de du Esperantaj poŝtmarkoj (1949 kaj 1954), de 5 serioj de oficialaj poŝtkartoj, kies bild-tekstoj estas en Esperanto, kaj

fine la plurfoje senkosta disponigo de specialaj Esperanto-poŝtŝtampoj. En 1948 li elektiĝis Honora Prezidanto de Aŭstria Esperanto-Federacio.

* * *



D-ro Dipl. Inĝ. Hannes Frenzel

Naskita en 1896, D-ro Frenzel studis en universitato de Wien, kaj en 1921 fariĝis oficisto de urbo Linz, poste direktoro de la Linza foiroficejo. Maldungiĝis en 1938. En 1945 li estis elektita kiel ministro por nutradaj aferoj, kaj en 1947 vic-prezidanto de la Ŝtata Kalkul-revizejo de kiu en 1953 li fariĝis prezidanto.

Lia patro estis Esperantisto, kaj li lernis kiel junulo la lingvon. D-ro Frenzel estas kunfondinto de la Aŭstria Laborista Ligo Esperantista, kaj ekde 1948 estis prezidanto de Aŭstria Esperantista Federacio, ĝis en 1953 li fariĝis honora prezidanto. Li multe partoprenas en gravaj Esperanto-aranĝoj en Aŭstrujo kaj eksterlande, kaj akcelas la agadon de la Aŭstra Federacio ĉe aŭstraj aŭtoritatoj.



Cecil C. Goldsmith

Cecil Goldsmith naskiĝis la 16an de novembro 1889 en Gloucester, Anglujo, kaj ricevis sian edukon en la teknika lernejo kaj poste en la Universitato de Birmingham. Li fariĝis Esperantisto en 1907 kaj en la fruaj jaroj estis tre aktiva en kaj ĉirkaŭ Birmingham. Plurajn jarojn li sekretariis ĉe Mezlanda Esperanto-Federacio.

En 1926, kiam la Brita Esperantista Asocio frontis al krizo financa kaj organiza, li ricevis la taskon gvidi ĝin el ĝiaj embarasoj, kaj liaj administraj kapabloj estis tiaj, ke kiam li forlasis BEA en 1936 por estiĝi nova direktoro de UEA post la morto de Robert Kreuz, BEA staris sur propraj piedoj kaj sur firma financa bazo. Li estis sekretario de tri Universalaj Kongresoj: en Oxford 1930, en Londono 1938, kaj en Bournemouth 1949.

Li en 1928 fondis The Esperanto Publishing Co. Ltd. (Esperanta Eldona Kompanio, akcia). De malgranda komenco EPC bone kreskis, kaj presigis ĝis 1954 pli ol 300,000 volumojn (pli ol 100 diversajn titolojn).

Li estis Teritoria Sekretario Brita por UEA 1926–1936, kaj partoprenis la organizajn diskutojn en 1932–33 inter la Landaj Asocioj kaj UEA, partoprenis la fondon de UFE, kaj estis unu el la t.n. “sep malsaĝuloj” kiuj en majo 1933 antaŭpreparis la Interkonsenton de Kolonjo. En 1934 li fariĝis komitatano de UEA, kaj restis tia ĝis li fariĝis direktoro en 1936.

Venis la divido de la movado, kaj post la kunsidoj de la Komitato en la U.K. Vieno, 1936, IEL fondiĝis je 1 septembro 1936, kun Goldsmith kiel Sekretario. Proprariske, je persona garantio, li havigis pruntojn de Esperantistaj amikoj je pli ol £1.000 por la uzo de IEL en la komencaj jaroj—kaj poste sukcesis repagi la tuton. En 1947 IEL kaj UEA kunfandiĝis. Dum la tuta tempo kiam li prizorgis la oficejon, la Jarlibro kaj la revuo akurate aperis, la administrado estis modele plenumita, je minimuma kosto.

Malgraŭ la multaj oficialaj postenoj, kiujn li okupis dum la pasintaj 25 jaroj, li ĉiam trovis tempon por lokaj grupoj kaj klasoj. Kiom da Esperantistoj li enkondukis en la movadon, kaj kiom li mem instruis dum la preskaŭ 50-jara Esperantista vivo, estas neeble kalkuli. Li ĉiam estis kaj restas tre populara homo inter la Esperantistaro.

En la fino de la nuna jaro S-ro Goldsmith emeritiĝos el sia posteno ĉe UEA, kaj ricevos la ripozon kiun certe li, preskaŭ pli ol ĉiu alia, meritas. Tamen ni povas scii sen ia dubo, ke li ne restos senlabora—kio estus tute kontraŭ lia karaktero—sed daŭrigos la multajn por-Esperantajn agadojn, kiujn li plenumas ekster la kadro de la Centra Oficejo.

27a Kongreso de S.A.T. en Nancy, Francujo

En la lorena ĉefurbo Nancy, plena de historiaj monumentoj pri ĝia plej brila epoko, la 18a jarcento, kunvenis 500 kongresanoj el 15 landoj (aliĝis 553 el 21 landoj).

Okaze de Interfratiĝa Vespero (sabate) ni aŭdis plurajn artistojn, inter kiuj la montmartra esp. kanzonisto Flego. En la Solena Malfermo K-do Bannier, la prezidanto de S.A.T., skizis la rolon de la asocio, ĝian lokon en la historia evoluo de la homa socio. Krom la landaj kaj sindikataj reprezentantoj salutis unu el la du ĉeestantaj vic-urbestroj; ankaŭ reprezentantoj de la Nancia Akademio kaj Universitato partoprenis la Solenon. Poste la kongresanoj estis akceptitaj ĉe la belega urbdomo de la ĉefurbestro mem.

En la unua laborkunsido K-doj Bannier kaj Bartelmes komentis la raportojn, kiuj aperis en *Sennaciulo*. Oni aprobis ilin per tre granda plimulto da voĉoj post debato, en kiu leviĝis akraj kritikoj kaj eĉ akuzoj sekve de artikoloj de Lucien Laurat en ĉi-jaraj numeroj de *Sennaciulo*. La Kongreso decidis transdoni tiun plendon al la Konflikto-Komisiono, cele de enketo.

En la dua laborkunsido oni raportis pri la ceteraj instancoj de SAT. Debato disvolviĝis precipe ĉirkaŭ la raportoj de la Literatura Komitato kaj de la Koresponda Servo. La eldono de nova Kantaro kun muziknotoj montriĝas nepre necesa.

En la tria kunsido oni vaste diskutis pri Interŝanĝo de Prelegoj en monda skalo kaj pri eventuala publikigo de kongresaj prelegoj en multobligita formo. Venontjara

kongresurbo estas Linz en Aŭstrujo (6–13 aŭgusto 1955). Por 1956 principe estas antaŭvidita kongreso en jugoslavia urbo.

La Gvidrezolucio akceptita de la Kongreso spegulas la firman volon de la anaro persisti en la vojo ekirita, malgraŭ ĉiuj obstakloj eksteraj kaj internaj, helpate de la por-esperantaj laboristaj esperanto-asocioj, kiuj formas la novajn SAT-anojn.

Ses instruaj kaj informaj prelegoj de la Laborista Universitato riĉigis la tre ampleksan kongresan programon, kiu estis tiel ŝargita, ke Fakoj kaj Frakcioj ofte ne povis elĉerpi sian tutan tagordon.

La du ekskursoj, unu tuttaga al Vogejoj kaj Kolmaro, kaj duontaga al la Mozelvalo kaj Lunevilo, plensukcesis dank' al la bona organizado kaj la tre favora somera vetero.

Gazetara servo funkciis tiel sukcese, ke ĉiutage longaj raportoj ilustritaj aperis en la regiona gazetaro—multe pli regule kaj amplekse ol en iu ajn ĝisnuna kongreso de SAT.

La radiostacio Nancia dissendis propagandintervjuon, en kiu partoprenis la esperantistaj infanoj. La Organiza Komitato perfekte zorgis pri la aranĝoj kaj sekve povis registri la merititan rekompencan por siaj laboroj kaj klopodoj.

Tre optimismajn komentojn elvokis la ĉesto de 25 esperanton-parolantaj infanoj el kvin landoj, kiuj organizis sian propran kongreseton, kun programo aparta de promenoj, vizitoj kaj ludoj, kaj kiuj nur la grandajn ekskursojn kaj festojn partoprenis komune kun la plenaĝuloj.

REGIONA KUNVENO EN KONSTANZ

La 25an de julio 1954 en Konstanz kunvenis Esperantistoj el Badeno-Virtembergo (Germanujo). Grandan ĝojon igis la alveno de Esperanto-grupo Zürich kaj de 40 partoprenantoj de la Internacia Ferio-Semajno, kiun organizis la entuziasma S-ano Michel Schmidt. La germanoj, scivolaj aŭdi ion pri la stato de Esperanto en la najbaraj landoj, spontane kontaktis al la eksterlandanoj—svisoj, svedoj kaj angloj. Posttagmeze okazis regiona kunsido en “Eŭropa Domo”.

Kiel prezidanto de la kunsido unuanime estis elektita S-ano Woldemar von der Ley. Post “La Vojo”, deklamita de Sinjo, la prezidanto salutis la ĉeestantojn kaj proponis sendi al S-ro Mendès-France salutleteron okaze de lia sukcesa porpaca batalo en Ĝenevo. La proponita teksto estis aplaŭde akceptita.

S-ano Michel Schmidt referis pri siaj impresoj dum la lasta kunveno en Grésillon. La viglaj Ravensburganoj aranĝis la 2an de majo kunvenon kun aliurbaj amikoj, akceptis eksterlandajn karavanojn kaj, estrataj de S-ano Ludwig Schopp, aranĝis kursojn, el kiuj la lastan gvidis instruisto Heinrich Müller (Lehrte) laŭ Cseh-metodo. La estro de la grupo Tailfingen, W. von der Ley, menciis nur la plej gravajn aranĝojn: sukcesplena Zamenhof-festo, kunveno en Tübingen, kie la fervora s-anino Lena Wessel fondis grupon kaj prezentis teatraĵon la 3an de julio, kun amikoj el aliaj urboj.

Per la “Preĝo”, parolita de Manjo Maute (Tailfingen), la kunsido finiĝis.

Sukcesa Kongreso de EANA en Nov-Jorko

La Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko komencis je la fino de Junio 1954 sian kvindekan jaron de ekzisto, per sukcesa kongreso en la urbo Nov-Jorko. De la 18a ĝis la 21a de Junio, membroj de la asocio el dudek ŝtatoj kaj provincoj de Usono kaj Kanado kunvenis por preparoli planojn por la 50-jara Jubileo kaj por ĝui distran programon aranĝitan de la Esperanto-Asocio de Nov-Jorko kaj la Esperanto-Asocio de Nov-Jerzio. Ĉeestis ankaŭ eksterlandaj gastoj el Francujo, Nederlando, Japanujo kaj Bolivio.

D-ro W. Solzbacher, eksprezidanto de EANA, prezidis la kongreson dum la foresto de la Prezidanto, Prof. John M. Brewer. Sabaton la 19an, kongresanoj dividiĝis en kvar forum-grupojn por pli intime diskuti pri: Organizo de Esperanto-kursoj, Propagando de Esperanto, Instrumetodoj, kaj Esperanto ĉe UNESKO. Gvidestroj estis respektive: Donald Walton, Prof. Harold S. Sloan, S-ino Leslie Davis kaj D-ro W. Solzbacher. Poste oni raportis pri temoj diskutitaj al plena kunsido de la Kongreso.

Raportoj de la Ĝenerala Sekretario de EANA, S-ro G. Alan Connor, kaj la estro de la Komitato pri Publika Informado, Prof. Harold S. Sloan, emfazis la faritan laboron por la propagando de Esperanto en Nord-Ameriko kaj la specialajn problemojn kaj metodojn.

Dum la distra programo prezentiĝis tri teatraĵetoj.

La Kongreso voĉdonis kelkajn gvid-rezoluciojn por la agado de la sekvonta jaro, kaj esprimas sian fidon al sukcesa Jubileo en la jaro 1955.

Eroj el Islando Liriko

Jon Thoroddsen, la verkinto de la sekvantaj poemetoj, mortis juna kaj nur postlasis 54-paĝan libreton, en kiu estas dekkvar poemoj en prozo kaj unu lirika akto. Tiu libreto estas la sola poemaro proza en lingvo islanda ĝis nun, kvankam multaj islandaj poetoj verkis unuopajn poemojn en prozo kun bona rezulto. La tradukinto esperas ke la jenaj poemetoj tuŝu iujn kordojn en la brustoj de lirikemaj legontoj.

Virino

Ŝi estis antaŭparolo al amo-biografio.
 Ŝi estis aldona ĉapitro.
 Ŝi estis interĉapitra spaco.
 Kaj nun ŝi estas mia amo-biografio.
 Sed oni forgesis presigi la vortojn :
 Ĉiuj rajtoj rezervitaj.

Ama historieto

Mi estas juna knabino, kiu dancas laŭ la vojo kaj kantas.
 Kiam mi renkontas lin, mi ĉesas kaj ridas.
 Kial mi ĉesas kaj ridas ?
 Mi dancas laŭ la vojo kaj kantas.
 Kiam mi renkontas lin, mi ĉesas kaj ridas.
 Kial vi ĉesas kanti ?
 Mi ne scias.
 Kial vi ridas ?
 Mi ne scias.
 Mi scias. Vi posedas juvelon kiun vi volas doni.
 Mi dancas laŭ la vojo kaj kantas.
 Antaŭ ol renkonti lin mi turniĝas kaj forrapidas.
 Li atingas min kaj etendas la manojn :
 La juvelon.
 Mi ne komprenas.
 Vi amas min.
 Li brakumas min kaj kisas min.
 Li brakumis min kaj kisis min.

* * *

Mi estas maljuna virino, kiu iras laŭ la vojo kaj ploras.
 Mi renkontas lin neniam plu.
 Kial mi iras laŭ la vojo kaj ploras ?
 Mi posedas juvelon, kiun mi ne povas doni.

Post la balo

Ĉu li amas min ? Ŝi demandis kaj ordigis siajn harojn.
 Ĉu li amas min ? Ŝi demandis kaj fuŝe sin pudris.
 Ĉu li amas min ? Ŝi demandis. La spegulo ridetis.
 Jes, diris la spegulo, kaj ridetis.

La perlo

La junulo serĉas la valoran perlon.
Mi estas malriĉa, diras la junulo.
Donu al mi. Mi volas aĉeti la valoran perlon.
Kaj oni donis al li multon.
Tiam li renkontas la melankolian knabinon.
Donu al mi, diras la junulo. Mi volas aĉeti la valoran perlon.
Tiam diras la melankolia knabino :
Ve al vi, junulo. Mi estas la sufero. Mi nur havas la strangan floron.
Donu al mi, diras la junulo. Mi portos ĝin ĉe mia koro.
Kaj li iras plu.
Tio ĉi estas vere stranga floro. Doloras mia brusto.
Kaj li iras plu, kaj oni donas al li multon.
Kiom riĉa mi estas, krias la junulo. Nun mi aĉetu la valoran perlon.
Kaj li serĉas, serĉadas, sed nenie troveblas la perlo.
Fine li aŭdas pri saĝulo kiu havas la valoran perlon, kaj li elserĉas la saĝulon.
Vidu kiom riĉa mi estas, krias la junulo kaj ĝojas. Mi volas aĉeti la valoran perlon.
Ĝi ne vendeblas, diras la saĝulo.
Tiam la junulo frotas al si la manojn kaj krias :
Por kio do estas miaj riĉaĵoj, se mi ne povas aĉeti la valoran perlon ?
Kaj li iras for, melankolia homo.
Donu al ni, diras la homoj, kaj la melankolia homo donas.
Donu al ni, diras la homoj, kaj li donas grandajn donaĵojn.
Tiam li reiras al la saĝulo.
Vidu kiom malriĉa mi estas, diras la melankolia homo. Donu al mi la valoran perlon.
Ĝi ne doneblas, diras la saĝulo.
Tiam la melankolia homo rigardas malsupren en silenta malĝojo, sed la saĝulo palpebrumas je unu okulo kaj demandas :
Ĉu vi donis vian tutan havaĵon ?
Jes, diras la melankolia homo.
Ĉu vi ankaŭ donis la strangan floron ?
Tiel demandas la saĝulo.
Tiam ekploras la melankolia homo.
Li amas la strangan floron.
Nu, nu, do tenu ĝin, diras la saĝulo.
Mi amas la strangan floron, krias la melankolia homo. Sed kion mi faru pri ĝi ? Vidu, ankaŭ ĝin mi volas doni.
Kaj li malkovras la strangan floron.
Sed ve, ĝi jam kreskis en lian bruston.
Tamen li elŝiras la strangan floron.
Kaj vidu, inter ĝiaj radikoj kuŝas la valora perlo.

Paul Bennemann

1885-1954

Mallonga sciigo en julia numero de *Esperanto* informis pri la forpaso, junion 1954 en Leipzig, de Paul Bennemann. Kun vera ĉagreno liaj amikoj en la tuta mondo tion eksciis kaj iliaj pensoj reiris al tiu-ĉi bela tempo, post la unua milito, kiam ree ekfloris nia movado en Germanujo kaj kiam en Leipzig ekestis centro de nia afero dank' al pluraj feliĉaj cirkonstancoj, inter ili la fekunda agado de eldonejo Hirt kaj filo, kaj de la "Vendreda Klubo", el kies membroj pluraj nomoj estas intime ligitaj al Esperanto: Profesoro Dietterle, D-ro Steche, D-ro Walter Lippman kaj Paul Bennemann.

Abunda kaj varia estas la kontribuo de Paul Bennemann al nia literaturo. Aliĝinte en 1909 al nia movado, li elektigis Ano de la Lingva Komitato en 1927 ĝis 1933, lia nomo ligiĝas al la bonega "Bennemann-Vortaro", Esperanto-Germana kaj Germana-Esperanto. Pedagogio, muziko kaj leksikologio estas la tri kampoj lerte kaj sperte prilaboritaj de li. Inter liaj tradukoj estas elstaraj tiu de la dramo de Hebbel: *Gyges kaj lia ringo*, kaj la tekstoj en la *Internacia Kantaro*, adaptoj de kantoj el multaj lingvoj, laboro ne superebla laŭ kvalito. Krom sennombraj kursoj de li gviditaj li kunlaboris al aro da periodaĵoj esperantaj. Lia lasta laboraĵo *Miru, Pensu, Ridu* ! multe ĝojigis legantojn.

La sorto ne favoris lin. La fatala jaro 1933 devigis lin forlasi agadon por Esperanto, tiom karan al li. Ne mankis la ĉikanoj flanke de la reĝimo, malsanoj kaj manko de vivbezonaĵoj, fine ankoraŭ esploro per la nuna reĝimo. Liberaj, ideoj sendependaj homoj ne havas ekzistrajton en tiu ĉi terparto. UEA provis interveni plurfoje, laste per ĵura deklaro pri absoluta fidindeco lia, farita de estinta prezidanto de UEA, Int. Generalo Bastien, la Prezidanto de la Akademio J.R.G. Isbrucker kaj la subskribinto. Trafe skizis Bennemann, nia bardo Kalocsay en la *Rimportretoj*.


Bennemann—sperta, akurata
Farinto de la Legolibro,—
Kolektis ĝin kun zorga kribro,
Kaj kun artgusto delikata.

En lia stil' konciza, glata,
Estas agrabla ekvilibro,
Bennemann—sperta, akurata
Farinto de la Legolibro.

Kaj de li estas kolektata
Ĉiupopola kanto-vibro,
Ĉar estas li en ĉiu fibro
Muzik-komprena, muzik-ŝata.

Bennemann, sperta, akurata.

H.J.



Tra la Libraro

Duope ricevitaĵojn verkojn ni recenzas ;
unuope ricevitaĵojn nur mencias.

*=akireblaj ĉe U.E.A.

*La recenzinto estas libera en sia prijuĝo de verkaĵo.
Lia opinio ne ligas la Asocion aŭ la Estraron de U.E.A.*

Pasko : danlingva orig. de Martinus. Trad. C. Graversen. Eld. Esperanto-sekcio de la Spirit-Scienca Instituto de Martinus, Kopenhago. 19×13 cm. 80 p. bind. prezo nemontrita.

Kiam aperis la unua eldono de la esperantlingva verko en 1946 en traduko de Th. Hammarlund mi iom longe komentis pri la etika valoro de la instruoj de Martinus (*Esperanto Internacia*, majo 1946). Interesatoj povas sin turni al tiu recenzo ĉar mi ne deziras ripeti, kion mi jam diris pri la enhavo. Por informo mi mencias nur, ke en *Pasko* troviĝas elokventa pledado por la ideo de mondsavado pere de la krucumo de Jesuo, kaj koncerne la vivon kaj konduton de la homo en la verko troviĝas konsilo pri la aplikado de konataj principoj por la atingo de la feliĉo.

Kun granda kontento mi rimarkas en la nova eldono la stampon de la Literatura Komitato de S.A.T. kaj tio mem garantias altan nivelon de lingvo-uzo. Preskaŭ la sola kritiko direktebla al la stila uzo estas la ĉiufoja uzo de *kiom*, kie temas pri grado sed ne pri kvanto. Tio verŝajne estas sekvo de la nuna modo sed ne konforma al la Zamenhofa nek al la logika uzado.

Prestekniko kaj bindado estas senmakulaj kaj la rezulto estas alloga svelta volumo tre plaĉa.

Mason Stuttard

Determinado de la plej ĝeneralaj planaj (ebenaj) paraanalitikaj funkcioj de Maurice Fréchet. (Annali di Matematica, XXXV, 1953, 255–268).

Grava traktaĵo de unu el la plej eminentaj matematikistoj de la mondo, kiu preferas publikigi en la internacia lingvo ol en iu nacia lingvo la rezultatojn de siaj esploroj. Gratulon.

C.M.B.

Ĉirkaŭ la Domoj kaj Kortoj en Indonezio de Arwani. 15-paĝa legolibro por komencantoj. Formato 20 x 16 cm. Eldonita de Ch. Sj. Datoe Toemenggoeng, Pintu Besi 39, Djakarta, Indonezio.


Du Malsanoj en Esperanto de H. A. de Hoog. 140-paĝa libro pri la uzado de kelkaj korelativoj en Esperanto. Formato 18 x 12 cm. Prezo 4 svedaj kronoj. Eldonis Erik Carlén, Hällabrottet, Svedujo.

Kaj tamen Dio estas Amo de D-ro F. W. A. Korff. Prezo Gld. 1. Formato 19 x 12 cm. 30 paĝoj. Tradukis el la originala nederlanda lingvo W. Versteeg-Graftdijk. Eldonis J. N. Voorhoeve, Dunne Bierkade 17, Den Haag, Nederlando.

Rakontoj de Velkinta Folio de V. Eroŝenko. Malgrandaj fabelaj skizoj de Ŝanhaja vivo. Dua libro en la serio Malgranda Biblioteko eldonita de Japana Esperanta Librokooperativo, 72 Kitaoogimaĉi, Kita-ku, Osaka, Japanujo. 40 paĝoj. Formato 15 x 10 cm. Prezo 2½ respondkuponoj.

Poŝtkartoj de Esperanto-Weg, Hamburg. Prezo 5 por 1 respondkupono, haveblaj ĉe Bruno Gahler, Esperanto-Weg, (24a) Glinde-Hamburg, Germanujo.

Steiermark (Stirio). Belega 16-paĝa kajero en kvar lingvoj kun Esperanta aldono. Formato 20 x 22 cm. Havebla kontraŭ 1 respond-kupono de Josef Eder, Stategg-Eichberg 72, Post Graz-St. Veit Graz, Steiermark, Aŭstrujo.



Radio kaj Esperanto

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo, horoj de la dissendoj estas laŭ la horszistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso.

Lundo	12.30–13.00	La Coruña. 250m. P.K. Radio Juventud, Real 71, La Coruña, Hispanujo.
	22.10–22.20	Wien. 513m., 48.74m., 25.46m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV., Aŭstrujo.
Mardo	11.55–12.00	Bern. 75.28m., 48.66m., 31.46m., 19.60m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.
	14.30–14.45	Montevideo. 280m. P. Radio Ministerio Ganaderia y Agricultura, Montevideo, Urugvajo (nur la unuan mardon de ĉiu monato).
	17.35–17.40	Bern. 75.28m., 48.66m., 31.46m., 25.61m. P. D-ro Baur.
	22.30–23.00	Valencia. 200m. P. Radio Alerta, Colón 11, Valencia, Hispanujo.
Merkredo	15.30–15.40	Wien. 203m., 48m., 41m., 30m., 25m.
	16.00–16.10	Caramulo. 205m. I. Rádio Polo Norte, Caramulo, Portugalujo.
	17.50–18.10	Roma. 49.92m., 31.35m. P. S-ro Minnaja. Radio Roma, Casella postale 320, Roma, Italujo.
	19.30–19.45	Barcelona. 360m. I.K. Radio Unión, Emisora del Frente de Juventudes, Barcelona, Hispanujo.
	22.15–22.20	Hilversum. 402m. I. V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
	22.15–22.30	Hilversum. 298m., 188m. P. (nur 1-IX, 29-IX, 27-X). N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando.
Ĵaŭdo	07.30–07.35	Lille. 218m. I.K. Radiodiffusion Française, Emission Esperanto, 36 Bd. de la Liberté, Lille (Nord), Francujo.
	08.30–08.45	Paris. 348m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	17.35–17.40	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	22.50–23.10	Zagreb. 264.7m. I. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
Vendredo	17.50–18.10	Roma. Kiel merkrede. P. D-ro Musella.
	21.30–21.45	Guatemala Cd. 470m., 197m., 47m., 30.50m. I. Radio Esperanto, la Voz de Guatemala, Gvatemalo, Mez-Ameriko.
Sabato	08.30–09.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K.I. Radio Ministério da Educação, Rio de Janeiro (DF), Brazilo.
	22.15–22.20	Hilversum. 298m., 188m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Radio Roma. 1-IX, La mistero de Pompei ; 3-IX, Somera libertempo ; 8-IX, La 26a Itala Esperanto-Kongreso en Sassari ; 10-IX, La universala genio de Platono, okaze de la 29a jarcento de la morto (427–347 a.K.) ; 15-IX, Folkloro vespero en Sassari ; 17-IX, Leterkesto kaj Bibliografio ; 22-IX, Tra Sardino, vojaĝimpresoj ; 24-IX, Bologna, la urbo de la 40a Universala Kongreso de Esperanto ; 29-IX, Vilaoj kaj ĝardenoj de Lago Maggiore.

Ni atentigas al la legantaro, ke leteroj skribitaj al radiostacioj ne nur kuraĝigas la dissendintojn, sed ankaŭ rekte kontribuas al pliperfektigo de la programoj mem. Oni skribu nur al la adresoj supre montritaj, donante raportojn pri aŭdebleco kaj aldonante, se konvene, objektivajn kritikojn.

Stepán Urban :

Niaj kantoj

LA muziko havas grandan signifon por ĉiu societo ; antaŭ ĉio ĝi estas instigilo unuaranga. Kelkfoje la muziko, aŭ kantaĵo, ludis gravan rolon en la historio, ekflamiginte entuziasmon por mondskuaj agoj. Ni nur menciis la *Marsejon* kaj *Internacionalon* ! Ĉiu ŝtato, sed ankaŭ ĉiu granda movado havas sian propran himnon aŭ batalkanton, esprimantan apartan etoson de la koncerna medio.

Kontraŭ tiu elektita speco—troviĝas enorma kvanto da popolkantoj, estiĝinte spontanee pro inundo de la sentoj. Iliaj aŭtoroj estas nekonataj, anonimaj. Kvankam ofte subtaksataj, la popolkantoj prezentas trezoron de ĉiu nacio ; por popoloj subpremitaj ili havis ĉiam valoron netakseblan, konservante obstine la cedantan gepatran lingvon kune kun ĝia aparta melodio kaj ritmo.

Inter la ambaŭ nomitaj specoj ni renkontas kvanton da kulturitaj kantoj artismaj, kiuj sin reprezentas sur la monda podio ; al ili fine aliĝas pli grandaj vokalaj verkoj, ĝisoratorioj kaj operoj. Tiuj fine povas prezenti mezurilon de kultura nivelo de la societo, t.e. socia tavolo, por kiu ili estas destinitaj.

“Kantoj ideaj” kaj himnoj kutime esprimas per sia etoso kaj vortenhavo originan ideon, ĉu ŝtatan, ĉu de ia movado, grupo. Ankaŭ nia Esperanta movado havas himnon, pli bone dirite—himnojn : *La Espero* de F. de Ménil sonas kvazaŭ signalo, alvoko. Kvankam malfacile kantebla, ĝi estas bona elekto por la komenco. Sed krome ekzistas dua himno, *La Vojo*.

Estas konate, ke la Majstro preferis ĝuste tiun ĉi poemon por muzikigo ; ĝis nun ekzistas kelkaj provoj kaj foje estos necese elekti la plej bonan, konforme esprimantan la tendencon de la Zamenhofaj versoj.

La kvanto de originalaj kantaĵoj, verkitaj baze de Esperantaj poemoj kaj tekstoj, ne estas ĝis nun tro granda kaj el tiu ĉi eta kvanto eĉ nur kelkaj aperis presite, plejparte en revuoj literaturaj ; bedaŭrinde oni ne dediĉis al originala verkado sufiĉe da atento. Kaj tamen ĝuste specialaj komponaĵoj, origine Esperantaj havas la plej bonan ŝancon sur ĉiu podio. Ĝenerale neesperanta publiko havas la okazon aŭdi kantojn latinajn, italajn, francajn ; ĵazmuzikon oni kutimas kanti angle : kial ĝi do ne akceptu valorajn kantaĵojn Esperantajn ? Dum internaciaj muzikfestoj oni kantadas en pluraj lingvoj, eventuala nekomprene de la teksto ne tro gravas. Kantojn Esperantajn oni ne aŭdas, parte ankaŭ pro tio, ke neniu insiste atentigas pri ilia ekzisto. En literatura revuo neniu muzikisto kutimas serĉi materialon por koncertoj ! Ne temas pri propagando al la aŭtoroj, sed pri praktika apliko de Esperanto kaj ĝia disvastigo.

Dum kantaĵoj originalaj tre oportune povas penetri en la indiferentan publikon kaj peri scion pri ekzisto de viva Esperanto, tradukitaj verkoj havas taskon tute alian. La traduko celas propre ekskluzive rondon Esperantistan ; ni konsideru, ke alie oni principe preferas aŭdi kanton en originala lingvo, kun teksto laŭ kiu ĝi estas komponita ! Kaj plie—apud la muziko tekstoj

havas ĝenerale flankan signifon ; pro tio ni ankaŭ ne komparu tradukon de kantoteksto — krom esceptoj — kun traduko de memstara poemo. Kion ni diris pri la tradukoj de artaj kantaĵoj, valoras por popolkantoj duoble : ili estas rekte kunfanditaj kun la nacilingva teksto kaj ĉiu traduko prenas de ili la freŝan superecon. Tamen aliflanke bone elektitaj popolkantoj donas valoran materialon muzikan, kaj tre faciligas komunan kantadon : bona traduko, aŭ parafrazo de popolkanto povas servi eĉ por kursoj, kie oni ĉiam bonvenigas melodion jam konatan. Oni do ne povas iel akre rifuzi tiun specimenon.

La plua evoluo sendube kondukos al kreo kaj akcepto de certa limigita kvanto da “kantoj ideaj” ; tiel, krom la himno, aperos specialaj himnoj landaj, eble eĉ klubaj kaj grupaj. Kiel ĉiu radiostacio havas sian signalon, ĉiu Esperantista rondo havu kanton “oficialan”. La disvolviĝo de originala verkado muzika estas plia ŝtupo ; ĝi dependas grandparte de la kulturemo de Esperantistoj mem. La kulturo postkuras nenium, oni devas ĝin serĉi, evoluigi, subteni . . . ! Poste eĉ Esperanto havos originalajn operojn kaj oratoriojn.

Pri la popolkantoj estas malfacile aŭguri : estas ja dubinde, ĉu ankoraŭ nun estiĝas ie novaj, kiel iam. Kulturita medio certe ilin ne produktas, ĉar ĝi konscias aŭtorecon de ĉiu verko. Tamen ne grave : la Facilflugila Muzo povas inspiri iun el niaj muzikemaj kaj talentitaj samideanoj ; kiu scias . . . ? Tiam ankaŭ la Esperanta popolo ricevos valoron, kiu tre similas al la freŝaj popolkantoj : sendube estiĝos originalaj Esperantaj verkoj, kiuj sukcesos esprimi la apartan etoson de nia medio.

Nacia Esperanto-Kongreso en Ĉeĥoslovakujo

Esperanto-rondo ZK ROH Otrokovice aranĝos en la tagoj 11a kaj 12a de septembro 1954 tutŝtatan kongreson de Ĉeĥoslovakaj Esperantistoj. La unua tago estos dediĉata al la temo “Esperanta Literaturo”, la dua tago estos gvidata per la devizo “Per Esperanto al la tutmonda paco”.

Enigma Konkurso

Solvoj de enigmoj :

N-ro 203 : Horizontale : makulribel-numer, aboniimitiutile, kolikbiletmimik, unikeetereelito, likenliterrekon, kapel-riparnobel, amaraizoliokazi, panikpolipbalot, erikoalineezoko, lakonripetlitot, natur-takelmoral, amikeavareoferi, tirankana-pretor, ukazoeraroarogi, renomleporlirik.

N-ro 204 : 1. debato, debeto, debito, debuto. 2. Ĉar li estas flavulo. 3. loĝi. 4. taksi. 5. gratulo.

N-ro 205 : Via dekstra mano ne sciu, kion faras la maldekstra. Sinjoroj sin batas, servantoj vundojn ricevas. Post vetero malbela lumas suno plej hela. Ne hontu penti pri faro, hontu persisti en eraro. Kiun favoras la sorto. por tiu eĉ koko estas ovoporta.

N-ro 206 : Kiu tro sin pravigas, tiu mem sin kulpigas. Laboro kaj pacienco kondukas al potenco. Ŝlosilvortoj : Kilometro-leki, izoterma-armi, urbanino-bani, trotuaro-orta, rabotilo-rolo, oriento-oni, sekretario-kesto, imperialo-aperi, najbaro-ja, politiko-piko, redakcio - arko, akcidento - cedi, violono-ino, iredenta-er, grandioza-nazo, akcipitro-citro, seroterapio-opero, tropika-kato, ironio-ono, uragano-nura, matadoro-dato, emulsio - ulmo, miraklo - karlo, solidara-ardi, impulso-supu, narkotiko-arko, karamelo-lama, utopio-puto, leciono-oni, patriarko-tripo, inĝeniero-eniro, garnituro-nigra, arbitraco-citi, siliko-ol.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 263

10an de aŭgusto 1954

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de Julio kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de julio 1953 :

	1953	1954
Asociaj membroj	5466	7007
Individuaj membroj :		
MJ 852		953
MA 3795		3839
MS 592		716
Patronoj 6		7
DM 260		272
HM 58		56
	5563	5843
	11029	12850

NOVA KOMITATANO

D-ro W. Herrmann, Bürstädterstr. 3,
(16) Lampertheim/Hessen, Germanujo.

DELEGITOJ

Argentino

Buenos Aires. FD (Filatelo) L. Vicino,
Maza 1448. Tel : 97-0438.

Aŭstralio

Melbourne (Victoria). FD (Junulaferoj):
vakas.

Sydney (N.S.W.). FD (Filatelo) : C. Hickey,
P.O. Box 23, Annandale, New South
Wales.

FD (Reklamado) : vakas.

Brazilo

Pompéu (Minas Gerais). D : D-ro H.
Fóscolo, Caixa Postal 10-A, Rua José
Maria de Carvalho 395.

FD (Filatelo) : La D.

Uniao da Vitória (Paraná). D : P. Real,
Rua D. Pedro II, no. 1139, Caixa
Postal 343.

Britujo

Chadderton (Lancs.). D : vakas.

Haverfordwest (Pembrokeshire). D : vakas.

Finnlando

Helsinki. FD (Literaturo) : vakas.

Varkaus. FD (Literaturo) : P. Paakkanen,
Poŝtkesto 18.

Francujo

Cannes (Alpes-Maritimes). D : vakas.

Le Boulou (Pyr. Orientales). D : M.
Basmans, Villa A.B.C. Tel : 27.

Menton (Alpes-Maritimes). D : A.
Thommerel, "Sweet-Home", 46 Rue
Pietra-Soretta.

Moulins (Allier). VD : J. Dettwiller, 27
rue du Cerf-Volant.

Paris (Seine). DF (Katolikismo) : F-ino
J. Le Boedec, 18 rue Ernest Cresson,
Paris 14^e. Tel : Ségur 73-60.

Hispanujo

Barcelona. FD (Stenografio) : La D.

Kanariaj Insuloj

Las Palmas. FD (Elektro-tekniko) : J.
Frugoni, Suarez Naranjo 20, Las
Palmas.

Norda Rodezio

Lusaka. D : L. Heilberg, Poste Restante.

Turkujo

Ankara. D : vakas.

Urugvajo

Montevideo. FD (Komerco) : A. Klein,
Uruguay 795. Tel : 9.23.59.

NOVAJ HONORAJ MEMBROJ

D-ro Karl Dworschak, Aŭstrujo

D-ro Hannes Frenzel, Aŭstrujo

Cecil C. Goldsmith, Anglujo

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Oliveira Leal, S-ro W. R., Caratinga,
Brazilo

Jacobi, S-ino E. A., Johannesburg,
Sudafriko

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1954

699. Marsol, S-ro L., La Palme, Francujo

700. Skog, S-ro F., Stockholm, Svedujo

701. de Nerini, S-ino M., Maracaibo,
Venezuelo

702. Clissold, Komandanto P., Sarisbury
Green, Anglujo.

703. Aleizo Martins, S-ro A., Belo Horizonte,
Brazilo

704. Pierce, Pastro J., Marian Glas,
Kimrujo

705. Riksmán, S-ro T., Tembellup, Aŭstralio.
 706. Schleicher, S-ro Ib., København, Danlando
 707. Schäfer, S-ro A., Dortmund-Mengede, Germanujo
 708. Frölich, S-ro P. A., Sao Paulo, Brazilo
 709. Zuhlke Juruena, S-ino C. A., Rio de Janeiro, Brazilo
 710. Couto Maciel, S-ro J., Salvador, Brazilo
 711. Olívio de Melo, S-ro J., Rio de Janeiro, Brazilo
 712. Francelino de Oliveira, S-ro J., Baturité, Brazilo
 713. Pádua, S-ro G., Rio de Janeiro, Brazilo
 714. Real, S-ro P., Uniao Vitória, Brazilo
 715. Nunes Rocha, S-ro P., Franca, Brazilo
 716. Baumslag, S-ro K., Johannesburg, Sudafriko
 717. Newell, S-ro L. N. M., Khartoum, Sudano
 718. Andersson, S-ro O. B., Lund, Svedujo
 719. Pereira de Souza, S-ro N., Rio de Janeiro, Brazilo
 720. Bondarovsky, S-ro E., Barra Mansa, Brazilo
 721. Bondarovsky, S-ro S., Barra Mansa, Brazilo
 722. Paes de Figueiredo, S-ro T., Macaé, Brazilo
 723. Gründler, S-ro M., Frankfurt, Germanujo
 724. Lemaire, S-ro, Pessac, Francujo

DONACO al la Ĝenerala Kaso : M. Pedroso, 3ŝ.

DONACOJ al la Fondaĵo Montevideo :

A. Criach 27ŝ., D. Escapa 9ŝ., J. v. Keulen 2ŝ., LEEN-sekcio Arnhem 24ŝ., Lancs. & Cheshire E-Federacio £5-13-0, Sydney E-Societo £12, Toronto E-Klubo £3-11-5, L. Muller 7ŝ., J. Soyeur 7ŝ., H. de Jong 5ŝ., Asocio de Esp. en Pollando 30ŝ., Mondcivitana Gr. de Bologna £1-1-3, Milana Katedro de Esp. 10ŝ. 3p., Mondcivitana Gr. en Ravenna 7ŝ., Mondcivitana Gr. en Modena 7ŝ., Gr. "Unueco" Graz £5-2-6, Gr. Knittelfeld 27ŝ. 6p., D-ro Halbedl 11ŝ., S-ro Wick 3ŝ., F. Höfert 11ŝ., Centra Dana Esp.-Ligo £6, F-ino G. v. Vliet 4ŝ. 6p., W. Spaander 18ŝ., A. Mosch 8ŝ. 6p., L. Chasserand 10ŝ., S-ino B. Carrière 10ŝ., J. Régulo-Pérez £1, Pariza Fervojisto £3, S-ro Gaume £1, Gr. en Thiers 6ŝ., Esperantistoj en Bilbao £2, Fed. de Toulouse £1-11-9, A. Ribot £1, Gr. de Paris £5, J. G. de F.

Sousa 6ŝ., B. E. Jernberg 21ŝ., Sveda Esp.-Fed. £17-6-0, Glasgow Esp.-Societo £5-10-0, Asocio de Esp. en Pollando 13ŝ., A. Wesser 7ŝ., Fed. de Islandaj Esp'istoj £10.

Sumo ĝis 31.7.1954 : £1,009 3ŝ. 9p.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

C. C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝo

Maertens-Mallet. Al Ges. G. Maetens-Mallet (Prins Leopoldstr. 51, Sint Kruis, Brugge, Belgujo) naskiĝis la 24an de julio 1954 tria filo, Guido.

Gefianĉiĝo

La 27an junio 1954 gefianĉiĝis F-ino Elisabeth Klenert kun S-ro Gernot Ritterspach, agema samideano en Heidelberg, Germanujo.

Al ĉiuj, niajn plej korajn gratulojn.

Niaj Mortintoj

Ni eksciis pri la forpaso de la jenaj samideanoj, al kies parencoj ni volas esprimi nian profundan kondolencon.

Ballard. Mortis la 23an de april 1954 fervora kaj agema samideano Aŭstralia, S-ro C. W. Ballard, je aĝo 87.

Hamer. La 18an de julio 1954, je aĝo 57, mortis S-ro Joseph Hamer, multajn jarojn membro kaj Delegito de UEA.

Hodges. La 7an de majo 1954 mortis en Rangiora, Novzelando, malnova kaj konata samideano J. A. Hodges. Naskiĝinte en Anglujo, S-ro Hodges havis la honoron ĉeesti la 1an Universalan Kongreson, kaj konatiĝi kun Zamenhof. Li mortis 71-jara.

Mittag. El Hannover, Germanujo, Samideano M. Mittag.

Nicholson. La 9an de julio 1954 en Feltham, Anglujo, mortis Kapitano C. Nicholson je aĝo 88. Li estis dum multaj jaroj aktiva samideano.

Woolfenden. En Rochdale, Anglujo, mortis la 22an de junio 1954 samideano T. Woolfenden, je aĝo 80. Esperantisto de post 1906, delegito de UEA dum multaj jaroj.

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.
Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.
Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Ho mia forto, al Vi mi min turnas ; ĉar Dio estas mia rifuĝo. *Ps. 59.9.*

Popollernejo jubileas : sendu por ekspozicio instruajn aĵojn. Rekompenccon. Konijnenperken 109, BRUSELO, Belgujo.

Lernantino 25-jara deziras korespondantojn tutmonde. F-ino Mary Thorpe, 36, Woodvale Road, BELFAST, Norda Irlando.

Kiu ŝatus ricevi belegan poŝtkarton novzelandan ? La Auckland Esperanto-Societo aranĝos poŝtkartvesperon la 29an de oktobro 1954. Ni garantias respondon al ĉiu. S-ro W. McLintock, Sekretario, Auckland Esperanto-Societo, Box 3013, AUCKLAND, Novzelando.

Je la ora jubileo de la grupo "Laboro", Munkeno, okazos ekspozicio. Bonvolu sendi bildkartojn, gazetojn k.t.p. La materialo apartenos poste al migranta ekspozicio de la nove fondita Sud-Bavara-Ligo. Ĝis oktobrofinio skribu al : S-ro Horst Spirat, Attenkoferstr. 55/o, MÜNCHEN 25, Germanujo.

Corrigé des Thèmes (*Cours Méthodique d'Esperanto*), de Aymonier—deziras aĉeti ekzempleron, eĉ uzitan, V. S. Silva, adr. Praca da República 54, 1, RIO DE JANEIRO, Brazilo.

Turismo en Benelux. Oficiala turista gvidisto plurlingva je via dispono : Loeckx, Fak-del. U.E.A., Konijnenperken 109, BRUSELO, Belgujo. Tel. 48.44.36.

Okaze de nova kurso la grupo de Clermont-Ferrand organizas letervesperon la 17an de novembro 1954. Sendu poŝtkartojn kaj leterojn, lokajn esp. eldonaĵojn, grupgazetojn, turismajn foliojn. Almenaŭ unufoje respondos : Groupe Esperanto, rue Jean Richepin, CLERMONT-FERRAND (Puy-de-Dôme), Francujo.

Novzelandano deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun la tuta mondo. Adreso : Harding Brown, 7, Scarborough Road, Sumner S.E.3, CANTERBURY, Novzelando.

50 junaj gekomencantoj deziras korespondi ĉiuteme. Nagoja Esperanto-Societo, Kurumada-tyo, Syowa-ku, NAGOYA, Japanujo.

Deziras korespondi pri Natura Sano-Scienco, por instrui pri plej bona sano kaj feliĉa, sukcesa, riĉa, longa, homa vivado, Louis Kalus, 3904, Lincoln Avenue, ST. LOUIS 13, Mo., Usono.

Em. Swedenborg, sveda sciencisto kaj klarvidulo, rivelas en siaj religiaj verkoj la novan lumon pri la koncepto de Dio kaj postmorta vivo. Lia filozofio akordigas la religion kun la scienco kaj baziĝas je la spirita senco de S. Biblio. La traktatojn senpage vi ricevos, se eble kontraŭ 1 resp. kup., ĉe : Jan B. Vlach, Luzická 21, PRAHA XII, Ĉeĥoslovakio.

Eŭropa Turista Servo, Konijnenperken 109, BOSVOORDE-BRUSSEL, Belgujo. Subtenu, petante turismajn informojn pri eŭropaj vidindaĵoj (1 resp. kup.).

Por monumenta karto pri Bruselo, turnu vin al S-ro Hirsch, Hôtel-de-Ville, BRUSELO, Belgujo.

Esperanto-ekspozicio okazos komence de oktobro en bela kultura salono de fervojstacio en Liberec, ĈSR. Samideanoj en la tuta mondo estu tiel bonkoraj kaj sendu al ni iomete novajn esperantaĵojn. Povas esti gvidlibroj, gazetoj, flugfolioj, bildkartoj k.t.p. Al ĉiu sendinto ni sendos belan bildkarton el nia urbo. Adreso : Fr. Pytloun, Leninova 518/4a, LIBEREC I, Ĉeĥoslovakio.

Ĉiu Esperantisto nepre volos posedi TRIBUTO AL NOBLA GENIULO de F. R. Jones

Juvelo—ĉiu Esperantisto legu. Vere rekomendinda, traduko bona, stilo klara, preso kaj eksteraĵo plaĉa.

Heroldo de Esperanto.

Bele presita kaj bonlingva verko—vivanta kaj valora.

Ferenc Szilágyi en Arbetar Esperantisten. Tre altvalora, elokventa, pasia kaj nobla. Kara juvelo en nia biblioteko.

Oomoto.

Profunde impresis min—admirinda kaj leginda.

W. A. Gething en British Esperantist. Lukse broŝurita. Rekomendinda legaĵo.

La Ponto.

64 paĝoj en modela Esperanto. Eleganta, firma, kartonita kovrilo.

Esperanto et Culture.

Prezo 4 ŝil. anglaj, sendkosto 3p.

Mendu ĉe

**UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO,
Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo.**

40-a Universala Kongreso de Esperanto

BOLOGNA, 30 JULIO—6 AŬGUSTO 1955

Adreso :

ĉe CIT, Piazza Nettuno N.2, BOLOGNA, Italujo

Aliĝilojn kaj pagojn akceptas ankaŭ

U.E.A., HERONSGATE, RICKMANSWORTH, ANGLUJO

ALIĜILO

Mi aliĝas al la 40-a Universala Kongreso de Esperanto en Bologna, kaj samtempe mi sendas pagon.

Familia nomo¹ S-ro, S-ino, F-ino

Antaŭnomo (voknomo)¹

Strato kaj numero¹

Urbo¹

Provinco¹

(nur en landoj, kie la poŝto postulas tion)

Lando²

Profesio²

Nacieco²

Antaŭnomo de edzino aŭ infano, kiu samtempe (pere de apartaj aliĝiloj)

aliĝas al la Kongreso

Naskiĝa jaro de persono malpli ol 20-jara

Dato

(subskribo)

¹ En nacia lingvo

² En Esperanto

Aliĝoj ne estos akceptataj post la fino de junio 1955

Skribu klare, se eble per skribmaŝino

KONGRES-KOTIZOJ

	ĝis	ĝis	poste
	31/12/54	31/3/55	
*Kongresano	37ŝ. 6p.	42ŝ. 6p.	47ŝ. 6p.
Edzo aŭ edzino de kongresano	18ŝ. 9p.	21ŝ. 3p.	23ŝ. 9p.
Junul(in)o ne pli ol 20-jara ..	12ŝ. 6p.	14ŝ.	15ŝ. 6p.
* Individuaj membroj de U.E.A. pagas	7ŝ. 6p.	malpli	(edzo/edzino 3ŝ. 9p.)